

FEDERACIA KUNVENO EN VIAS (19 V) .

(Surbaze de notoj de Charles Gérard (CG), Francis Bernard (FB), Jean Hénin (JH) .

La raporto ne sekvas nepre la ordon de la intervenoj . Aldonaj rimarkoj en kursivoj .)

Partoprenas 23 personoj . La prezidanto JH bonvenigas la ĉeestantojn kaj dankas al la organizantoj de la staĝo de Vias pro la disponigo de la salono; li senkulpigas Claudine Coulomb (30), Colette Carbonnel (11) kaj Michael Simon (30). Ĉiuj departementoj estas reprezentataj krom Aude . *Komitatanoj, kiuj ne povas partopreni, estus afablaj informi pri la nepartopreno kaj eventuale doni prokuron al iu .*

Antaŭ ol detali la raportojn, JH memorigas pri baldaŭaj eventoj :

-la grupo de **Arles** invitas al la 90a datreveno de sia fondiĝo (ekspozicio, sonregistroj, projekcio) : 24/

-amika semajnfino en **Olargues** (34) ĉe G. Paing kaj H. Olek la 16an k. 17an de junio, la programo aperis en SFS . Gilbert Santos kaj Marie-Thérèse Lemaire sin proponas por 2002 en Campagnan .

-**Vinilkosmo** (31450 Donneville, ĉe Floréal Martorell) daŭre eldonas kasedojn kaj KD-ojn kaj estas subteninda . Vendiĝas kelkaj ekzempleroj de "Sojle de klara temp" po 70F. Laŭ recenzo de "Franca Esperantisto" : "Vera regalo frandi tian diskon, pro kvalito malofita en esperantujo" . *La laste aperinta KD celas konatigi la bretonan kulturon al la mondo kaj enhavas 8 bretonajn kantojn, interpretitajn de la Bretona Esperanto-Koruso Meven .*

-**Ludo "La etapo"**; ĝi ekzistas en pluraj lingvoj inter kiuj esperanto . JH montras ekzempleron, kiun oni provos dum la staĝo de Vias . La ludo estas mendebla al la fabriko kaj kostas iom pli ol 250 F . Ĝi estas plej oportuna en somero, ĉar baziĝas sur la principo de "Tour de France" .

-En oktobro, de la 12a ĝis 14a, disvolviĝos la kataluna kaj 3a transpirenea **kongreso en Ĝirono**.

Informoj ĵus ricevitaj aperas en tiu numero de SFS . Bonvolu konsideri vian partoprenon .

-Pluraj **forumoj de asocioj** estas jam anoncigitaj en septembro . Gravas partopreni kaj nin konigi je tiu okazo . Nia **aŭtuna kunveno** okazos post tiuj forumoj kaj antaŭ la semajnfino pri lingvoj de la 29a de septembro, restas do **sabato la 22a de septembro** . Propono kunveni en **Narbonne** . C. Herbette indikas kontaktadreson .

Bilanco pri la lastaj monatoj :

-**Kampanjo Robineau** (disdono de libroj al bibliotekoj) . Duonkontentiga rezulto, ĉar iuj slipoj ne revenis aŭ revenis kun nesufiĉe da indikoj por ekspluati poste; foje la libroj ne estis enmanigitaj al la koncernaj personoj . Jean Gauthier memorigas, ke ekde la komenciĝo de la okjara vojaĝo, Ges. Robineau ĉiam elturniĝis por financi la projekton . Alvoko en la lasta SFS por venigi ilin fine de septembro, do je tre taŭga dato por varbi, restis senefika . Propono pagi prelegon en Nîmes, kie la grupo malfortas . Tamen estas bezonataj pluraj lokoj por organizi ion .

-Lastatempe la federacio daŭrigis siajn klopodojn por esti bone ekipata je **materialo** . Tiel ni disponas nun pri paneloj por ekspozicioj kaj forumoj, pri elektronika panelo por varbado, pri lumbildprojekciilo por prelegoj, kunvenoj, staĝoj, pri "kombinaĵo" (televidilo + magnetoskopo) por la sama celo . Ne hezitu pruntepreni la materialon por via esperanto-agado, informu anticipe kaj ne lastminute . *Paneloj + banderoloj estas momente ĉe FB, la aparatoj ĉe JH kaj la elektronika panelo ĉe la grupo de Béziers*

-**Informado** : Baldaŭ estos preta hejmpaĝaro sur la reto por prezenti esperanton, nian federacion, la kursojn, staĝojn, ktp . JH montras plurajn paĝojn realigitajn de nia juna amiko Mikaelo, kiun ni varme gratulas . En septembro aperos anoncetoj en diversaj gazetoj de la regiono por retemuloj; prizorgos la aferon FB . La federacio aĉetis kvanteton da informbroŝuroj "Mode d'emploi" kaj ĉiu grupo ricevas 25 ekzemplerojn . Aliaj broŝuroj estas mendeblaj po 3 F . "Franca esperantisto" fariĝis "le monde de l'E°" . Se oni salutas la belan prezenton de la revuo, ne ĉiuj konsentas pri la fakto ke grandparte ĝi estas en la franca kaj tiel konkur(enc)as "E° info" . *Intertempe FB fariĝis sekretario de la asocio "E° info"* .

La federacio disponas pri pluraj ekzempleroj de la unua numero de "Le Monde de l'E°"; ili estas mendeblaj al SFS (25 F) . Estas disdonataj ekzempleroj de la porjunula gazeto "Coup d'oeil" .

La federacia bulteno SFS (Sudfrancia Stelo) aperas regule . Dankojn al André Capus pro la servo .

Bonvolu laŭeble respekti la limdatojn, sendi tekstojn jam redaktitajn en E° pri via agado, viaj klopodoj, iniciatoj, sukcesoj kaj malsukcesoj, kiuj povos utili al aliaj . Pluraj el ni foje rebatas malfavorajn artikolojn en la gazetaro, dum elsendoj, ktp . Kelkaj pozitivaj rezultoj . FB mencias freŝdatan recenzon de libro de C. Piron en la revuo de Amopa .

-**Gastprelegantoj** . Gravas la reliefigo de la vizitoj de eksterlandanoj, okaze de privataj vizitoj, de E°-semajno, de rondvojaĝoj kiel tiuj organizitaj de UFE . Bedaŭrinde nur la grupo de Béziers estas sur la listo de invitantaj grupoj . Averaĝe la kostoj por partopreno en tia rondirado sumiĝas je 300 F . Oni

devas kompreni, ke en la lando de la gasto povas esti delikata situacio kaj estas rekomendinde diskuti pri tio private por ne ĝeni publike la personon, kiu mem ne kulpas. Suzanne Authier (SA) raportas pri la diversaj problemoj kun la irana paro. Jarfine estas anoncata la vizito de ĵurnalisto el Dagestano.

-Vivo de la grupoj. JH memorigas ke la federacio ne anstataŭas la grupojn, ke la federacio estas tegmenta asocio, por tiuj, kiuj bonvolas esti en la domo, ke ĝi celas pliproksimigi la esperantistojn, helpi la izolitojn, kunordigi agadojn, informi, iniciati se ne iniciatas grupoj kaj individuoj ... E° estas ĉies afero sed tio ne signifas, ke oni faru kion ajn senorde.

La situacio en Gard estas zorgiga. *Despli post la informo de C. Coulomb (vidu p.5)*. En Montpellier la grupo estis reorganizita, ni deziras sukceson al la nova estraro. Espereble la grupo revigliĝos. Bone, ke la semajno de Sète pluvidos. La nova asocio "Esperanto, Culture et Progrès", kiu prizogas la semajnon, petas aliĝon al la federacio. Ĝiaj statutoj akordiĝas kun la niaj kaj la peto estas unuanime akceptata. "Réinsertion et E°": Ni gratulas pro la dungo de Zohra. Ni ne estas multe informataj pri la agado de la asocio. Foje estas bedaŭrinda konkurado kun la federacio, kiel ekzemple ĉe Iufm aŭ forumoj de asocioj. JH miras pri la peto de RE esti agnoskita de UFE kiel faka asocio. FB opinias, ke ĝi estas nacia asocio. JH bedaŭras la displitiĝon de la esperantistoj de Montpellier en kvar grupojn. Iuj opinias, ke diverseco estas bona afero. La plimulto opinias, ke necesas regulaj rilatoj kaj informoj inter la diversaj grupoj/asocioj. Béziers: malgraŭ la malfrua elekto de nova loko por la staĝo, pli ol 40 homoj partoprenos. Ne malutilis la bona informado en la E°-gazetoj (fare de SA kaj FB). La staĝejo havas kelkajn novajn avantaĝojn. Gratulojn al C. Herbertte kaj lia skipo. Bonan sukceson al la staĝo, *kies datoj estas jam konataj por 2002 (vidu p.4)*.

-Movado. JH legas respondon de Ministro J. Lang al letero de Mikaelo. Ŝajne estas nova sinteno de la ministerio pri edukado, eble dank' al la speciala konsilanto pri lingvoj C. Hagège (*Vidu ankaŭ p.12*), ankaŭ pro la deziro favori la regionajn lingvojn antaŭ la balotoj... André Capus atentigas pri iuj danĝeroj de la ĉarto pri la regionaj lingvoj.

Fronte al la nuna situacio, estas domaĝe, ke la asocioj kiel Ufe/Sat-Amikaro ne kapablas vere kunlabori. En Limoges okazos kongreso de pluraj asocioj sed Sat-Amikaro jam kongresis aparte, eĉ decidis pri la lokoj de la tri venontaj jaraj kongresoj. Pri Ufe oni miras, ke membroj ne estas informitaj en la asocia bulteno pri la programo de la nacia kongreso (anstataŭigita de "aktivula semajnfino" lastjare) kaj devas ĝin peti. Ges. Bernard partoprenos tiun kongreson kaj reprezentos nin. *Fakte ili ne partoprenis, pro tio aperas neniu raporto pri la kongreso*. La temo estos la jaro de la eŭropaj lingvoj kaj oni planas kampanjon por revigligi la grupojn, asociojn ...

Financa raporto:

Lucette Négron raportas detale pri la bona stato de la financoj. Tiuj, kiuj deziras, povas ricevi la raporton kun ciferoj. Ĉijare estas negativa saldo pro la aĉeto de materialo. LN dankas tiujn, kiuj sin dediĉas al nia afero kaj neniam petas repagon de elspezoj. FB rimarkigas, ke sin dediĉi al E° signifas investon de tempo kaj mono. LN memorigas, ke por nia aŭtuna kunveno oni bonvolu indiki anticipe la antaŭvideblajn elspezojn por projektoj kaj ke ĉiam validas la regulo de principa, anticipe decido de la komitato aŭ estraro kaj de prezento de fakturoj antaŭ eventuala repago. JH indikas denove, ke la federacio ĉiam pretas helpi gejunulojn, kiuj lernas la lingvon, por partopreni staĝojn, kongresojn, ktp.

La morala kaj financa raportoj estas aprobitaj (unu sindeteno).

Komitato: Oni forgesis lastjare decidi pri la dato de renovigo de 1/3 de la komitato. Post lotumo, estos 2002: Authier Suzanne, Brandy Patrice, Negron Lucette, Vidal Madeleine, Gérard Charles
2003: Bernard Monique, Coulomb Claudine, Gauthier Jean, Terral Fernande, Tora Annick
2004: Bernard Francis, Carbonnel Colette, Hénin Jean, Saladin Thierry (? Boubker Zohra, Simon Michael)

Henryka Olek petinte prezentadon de sia trimonata vojaĝo al Brazilo kun Gérard, ni modifas la posttagmezan programon kaj ne aŭskultas la jam dufoje prokrastitan registron de la debato inter C. Hagège kaj Moon. La du kasedoj estas pruntedonataj al Jean Gauthier, kiu transdonos ilin poste al L. Négron, de kiu ili estos pruntepreneblaj. Henryka rakontas grandlinie la interesan vojaĝon al la suda hemisfero kaj la varman akcepton de la fervoraj brazilaj esperantistoj.

Fine de nia kunveno FB proponas vendi surloke kaj senprofite diversajn propagandilojn.

Ni rendevuas ĝis la 22a de septembro je la 10a horo. Se detaloj ne aperos en SFS, bonvolu informiĝi. Al ĉiuj bonajn feriojn en Esperantio! Raportojn ni esperas en septembro!

Provis redakti J.H.

VIVO DE LA FEDERACIO

BEZIERS

Antaŭ la somero, jen la novaj informoj :

La 8an de septembro okazos, kiel ĉiujare, "Les associations font les Allées" . Ni bezonos ĉiujn bonvolemlulojn por gardi la budon, informi kaj, se eblas, varbi novajn gelemantojn .

Poste, la unua kunveno okazos **la 15an de septembro**, ĉefa temo : organizo de la kursoj, kiuj devos komenciĝi kiel eble plej rapide . En **oktobro**, la monata kunveno estos **la 13an (sabaton)**, ĉiam en nia kutima ĉambro de la MVA je 14h30 .

Laboru bone dum la venontaj monatoj por ne forgesi la lingvon kaj kuraĝe cerbumu pri la diversaj venontaj agadoj . *Agrablajn kaj bonajn somerferiojn !*


Staĝo de Vias :

Ĝi bone disvolviĝis la lastan semajnon de majo . Venis 39 staĝanoj kaj 4 instruantoj . La nova loko estis agrabla, la manĝoj bonaj . Sed la partoprenintoj trovis la seĝojn... tro malmolaj . Tio estas vera; sed la estro promesis, ke venontjare ni povos ĝui pli komfortajn seĝojn kaj ankaŭ pli taŭgajn klasĉambrojn . Krom tiuj etaj materiaj aferoj la staĝanoj estis kontentaj kaj profitis de la kursoj . Gratulojn al la gvidintoj . La ekzamenoj altiris 4 kandidatojn por la Atesto pri lernado kaj 6 por la Praktika lernado . Ni esperas, ke multaj revenos en 2002 . La datoj antaŭviditaj estas **de la 22a ĝis la 29a de majo 2002** . Entute kontentiga staĝo . La nova organizanto C. Herbette tre serioze, efike kaj diskrete laboris . Ni devas varme danki lin pro tio . Ni ankaŭ ne forgesu ĉiujn aliajn helpantojn, kiuj kontribuis al la bonaj rezultoj de la staĝo .

Iun tagon okazis gvidata vizito de Agde . Ĉiutage J-P. Peray gvidis kurson pri desegno, post la tagmanĝo : bona malstreĉo meze de la tago . La vesperoj, tre variaj, bone finis la studotagojn . Ni spektis lumbildojn pri la kongreso de Tel-Aviv, filmon pri belega vojaĝo tra la artaĵoj de Egiptio, alian filmon "Babel", paroladeton pri savismo (helpo al la viktimoj de akcidento). Tiu lasta temo, ne tro gaja, tamen tre utila, kaptis ĉies atenton . La lasta vespero ebligis malkovri la talentojn de la staĝanoj : kantoj, poemoj, skeĉoj vigle alternis (tekstoj de Schwartz, Baghy, ktp) . Granda sukceso por tiu vespero . La staĝo finiĝis per komuna aperitivo kun kuketoj kaj ni adiaŭis kun la promeso denove renkontiĝi . Dankon al ĉiuj !

(Raportis S. Authier)

NDLR : "Dankon al ĉiuj !", al la organizintoj de la staĝo en nova loko, al la gvidintoj, al la partoprenintoj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj kontaktis la E-gazetojn por regule anonci la staĝon .



Amika semajnfino en Olargues :

La amika semajnfino en Les Sagnes apud Olargues okazis sub ne tre blua ĉielo, tamen preskaŭ sen pluvo, sabaton la 16an kaj dimanĉon la 17an de junio . Ni ĝojis belegan pejzaĝon kaj varmkoran akcepton . Pro tio ni dankas niajn gastigantojn Henryka kaj Gérard .

Sabaton posttagmeze ni piedpromenis laŭlonge de vinberejoj kaj arbaroj . Vespere ni interese rigardis vidbendon pri la trimonata vojaĝo de Henryka kaj Gérard tra Brazilo, kie ricevis ilin afablaj esperantistoj . Dimanĉon matene, okaze de la "journée du patrimoine", ĉiĉerono vizitigis al ni la vilaĝon Olargues, enlistigitan en la plej belaj vilaĝoj de Francio . Ni admiris mezepokajn domojn, stratetojn, ponton kaj restaĵojn de kastelo datumitajn de la dekdua jarcento . Posttagmeze ni piedpromenis en la ĉirkaŭaĵo de "les Sagnes" ĝis la fonto, kiu provizas la etan vilaĝeton per bona freŝa akvo . Ni esperas travivi aliajn agrablajn esperantistajn renkontiĝojn .

(Raportis Francis kaj Monique Bernard)

NDLR : Ankaŭ menciindas en Les Sagnes mirindaj cedroj... kaj ĉerizarboj ! Niaj gastigantoj ankaŭ montris al ni longan raporton en "Süddeutsche Zeitung" fine de 2000, kie Les Sagnes estas priskribita kiel la ĉefurbo de esperanto...

GARD-LOZÈRE

Nia juna amiko Mikaelo Simon skribis al Ministro Jack Lang pri E° kiel elektebla studobjekto je bakalaŭro. Legu la respondon sur la paĝo **12**. Mikaelo ankaŭ preparis belan hejmpaĝaron sur la reto pri E° en nia regiono . La tuto estos preta kaj konsultebla ekde septembro (detalojn vi trovos en la venonta SFS) . Gratulojn pro lia senĉesa laboro poresperanta !

Claudine Coulomb, prezidantino de la grupo de Nîmes, perdis sian patrinon komence de junio . Ŝia telefonnumero ne plu estas valida kaj baldaŭ ŝi translokiĝos al alia adreso. Oni bonvolu dum iom da tempo ne konkati ŝin pri E°- aferoj . Ni petas nian amikino akcepti nian koran kondolencon .

Pli frue F. Bernard donacis al AMOPA (Association des Membres de l'Ordre des Palmes Académiques) la libron de Claude Piron "Le défi des langues" . Recenzo sufiĉe longa aperis en la n° 152 de la revuo de tiu asocio (vidu la tekston p.13).

Duobla kaskedo : nia helpsekretario Francis Bernard estis elektita sekretario de la asocio "Esperanto-info" . "E°-info" estas gazeto en la franca, kreita en 1994 de R. Llorens, nun prizorgata de R. Tosoni (Rue du Château d'Eau 82290 Meauzac Tel : 05 63 31 51 77); jarabono 50 F por 4 numeroj (E° info CCP 11 901 46 B Marseille). En la estraro estis ankaŭ elektita Thierry Saladin . Gratulojn al ambaŭ ! Espereble "Esperanto-info", kiu celas ne-esperantistan publikon dank'al informado pri la realeco de la internacia lingvo sed ankaŭ informas la esperantistojn pro la aktualaj temoj prilingvaj pritraktataj, sukcesos disvolviĝi malgraŭ la aperigo de "Le monde de l'E°" de UFE, grandparte redaktita en la franca lingvo .

MONTPELLIER :

Centre Culturel :

Ĵaŭdon la 7an de junio kunvenis 19 personoj en la MPT ("Ĉiesdomo") Escoutaire kaj festis iom anticipe la finon de la printempo . Ili kunportis trinkaĵojn, kukojn, aliajn manĝaĵojn kaj... bonan humoron !

Poemoj, rakontoj, anekdotoj, enigmoj varmigis la etoson : tiel oni decidis iomete labori . Oni parolis pri la venonta kunveno (nepre antaŭ la tago de **la forumo de la asocioj je la 9a de septembro**) . Oni preparos tiam la budon de la forumo, precize je la 18a horo **ĵaŭdon la 6an de septembro** . Bone notu la rendevuon ! Ĝis la revido kaj al ĉiuj bonajn feriojn !

(Raportis Rosa Aumeunier-Raspall)

Esperanto, Culture et Progrès :

Prepariĝas la 27a internacia semajno . Pli ol kvardek personoj estas atendataj . Informoj aperis en diversaj E°-gazetoj . Vidu p.6 fotokopion de la artikolo aperinta en la dua numero de "Le monde de l'E°" . Ne estas tro malfrue por aliĝi sed, se vi intencas partopreni, faciligu la laboron de la organizantoj kaj aliĝu plej baldaŭ !

Réinsertion et E° :

Ankaŭ pri RE aperis informoj en diversaj gazetoj, inter kiuj la lasta bulteno de la Mondcivitanoj (duonpaĝo sur la dua paĝo), kiu ankaŭ mencias diversajn eventojn en Esperantio .

La estraro de RE decidis unuanime la 7an de junio peti trian junuldungon ("emploi jeune") . Anne-Claire kaj Patrick sekvas la duagradan kurson tre serioze . Estos kontaktataj firmestroj en la regiono . Solidaj argumentoj estas bezonataj por konvinki ilin pri la utilo de formado de iuj el iliaj salajritoj al esperanto . Fakte, malgraŭ kelkaj eventualaj eblecoj en septembro, la esperoj en la lerneja medio estas seniluziigaj ... Krome la vojaĝkostoj por viziti diversajn urbojn estas relative altaj .

(Informis Patrice Brandy)

FORUMOJ DE ASOCIOJ *(certe la plej bona okazo en la jaro por varbi)*

La datoj de pluraj forumoj estas jam konataj . Partoprenu, helpu, konvinku pri la utilo de esperanto ! Ne provu tuj vendi abonon, kurson, libron, ktp . Ankaŭ aŭskultu la argumentojn de la vizitantoj, kiuj eble volas nur informiĝi . Eventuale rezervu la federacian materialon (vidu p. 2) anticipe kaj akordiĝu kun la grupo tuj antaŭ aŭ post vi ! Bonan sukceson !

Béziers : la 8an de septembro, Montpellier la 9an, Agde la 15an kaj Perpignan la 6an de oktobro
La federacio volonte helpos aliloke por prezenti esperanton okaze de forumoj de asocioj .

PERPIGNAN : GFEN 66 (Groupe français d'éducation nouvelle) organizas je sabato la 6a de oktobro, kun la individuoj kaj asocioj, kiuj interesiĝas pri lingvoj kaj defendas plurlingvismon, **feston de la lingvoj** ("Festa des Langues"). Tiu festo disvolviĝos en la **arsenalo, strato Vielledent**. Nia grupo havos sian propran budon kaj invitas vin ĝin viziti. Estas ankaŭ planataj je tiu okazo diversaj debatoj.

KATALUNIO : Ĝus alvenis la programo de la 30a Kataluna kaj 3a Transpirenea Kongreso de E° en Girono (12a ĝis 14a de oktobro). Vidu detalojn kaj aliĝilon p.7 kaj 8.

ARLES : La loka grupo festis je dimanĉo, la 24a de junio, sian 90an datrevenon. Estis prezentitaj 6 paneloj, unu memorigis pri ĉiuj UK, alia montris leterojn de Lydia Zamenhof. Oni aŭskultis registron de Honoré Bourdelon, kiu konis Frédéric Mistral. Post la tagmanĝo oni spektis lumbildojn pri Ĉinio.

PRI LA SEMAJNO DE SETE

27^e Semaine Internationale au bord de la Méditerranée

Elle aura lieu du 25 août au 1er septembre 2001 (dernière semaine des vacances scolaires) à la Maison Familiale du Lazaret à Sète, ville de Paul Valéry et de Georges Brassens.

trois cours de niveaux différents ont lieu tous les matins et en fin d'après-midi. La participation d'étrangers et d'espérantophones chevronnés permet une immersion linguistique, et donc un usage naturel de l'espéranto. Cela entraîne des progrès rapides.

La proximité de la mer (la maison familiale est en bordure de la plage) offre la possibilité de se baigner plusieurs fois par jour. Les après-midi sont libres, ce qui permet à chacun de les passer à son goût : farniente sur la plage ou dans le parc, visite de la région très riche sur le

plan touristique, sieste, scrabble dans le parc... Les journées se terminent par des soirées culturelles ou ludiques.

On peut loger à la Maison Familiale où, bien que ce soit les vacances scolaires, nous bénéficions du tarif hors-saison.

Voici une bonne occasion pour se lancer dans l'étude de l'espéranto, ou en améliorer sa connaissance, tout en passant une agréable semaine dans un cadre merveilleux : un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée à une période idéale où l'on-



("Le Monde de l'espéranto" n° 2)

jouit d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.

Yvette Vierne

Renseignements et inscription : *Espéranto, Culture et Progrès*, 5 rue du Docteur Roux, F-34090 Montpellier, tél./fax 04 67 54 15 43, (yvienne@netcourrier.com).

KONGRESO DE CHAMBERY (SAT-AMIKARO)

Les jeunes espérantistes participent également à ce congrès. Beaucoup sont venus à cette langue par envie de « voyager, communiquer, s'amuser ensemble, en pouvant se parler et se comprendre sans passer obligatoirement par l'Anglais ». Pour eux, l'espéranto « est une langue équitable car tout le monde fait l'effort de la parler. En effet, on a la même monnaie, le même Parlement, mais pas la même langue, si ce n'est le "Basic English" qui couvre 200 mots maximum. L'espéranto nous permet d'élargir notre champ de vision, et de pouvoir nous ouvrir aux cultures du monde entier ». Les nouvelles technologies sont un outil utile pour eux. « Nous envoyons par internet des informations en espéranto, aux quatre coins du monde et qui peuvent ensuite être traduites dans les langues nationales. Nous avons également un cours d'espéranto sur notre site internet jefo@esperanto.org ».

("Le Dauphiné Libéré" 17 -IV)
Parto de artikolo pri la kongreso kaj Eo

Poŝtkarto sendita el Chambéry kun la speciala kongresa stampo)

56-a KONGRESO


SAT-Amikaro




ESPERANTO

Langue internationale

du 15 au 17 avril 2001



CHAMBERY
FRANCIS



al Jean HENIN

Route de Montcayroux

48500 LA CANOURGUE

*Amikaj salutoj
de Chambéry*

[Signature]

MENDILO

Kongres- tagoj	tag- manĝo	vesper- manĝo
vendrede	_____	_____
sabate	_____	_____
dimanĉe	_____	_____

(BANKEDO)

Junulara Restadejo - vendredo sabato

(Marku per x la servojn, kiujn vi antaŭmendas)

ANTICIPE PAGENDAJ

Kotizo laŭ kategorio en periodo p-toj

- Rezerva 20% anticipa pago por manĝoj, Junulara Rest. kaj bankedo (deprenebla de la surloka pagota totalo)
- Donaco por la Kongreso
- Entute mi sendas per la ebleco elektita per X ĉi-sube p-tojn

 per trastrokita ĉeko nome de Kataluna Esperanto-Asocio per poŝtgiro ankaŭ nome de nia Asocio per bankmandato rekte al la konto de nia Asocio en "La Caixa" 2100-0461-90-0200055053

Sendu ĉi tiun aliĝilon kaj samtempan kotizon al la:

KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
Apartat 290 - 08200 SABADELL

Kunlaboras:

Generalitat de Catalunya
Departament de Cultura

Ajuntament de Girona

←
vidu ankaŭ p. 7

KOTIZTABELO

KATEGORIO	periodo 1 Ĝis 31.07	periodo 2 ĝis 30.09	poste	tage
A. Kongresano membro de KEA de ties aliĝintaj Grupoj kaj de Transpireneaj Federacioj	4.000	4.500	5.000	1.500
B. Familianoj A	2.000	2.500	3.000	800
C. Gejunuloj membroj de KEJ	2.000	2.500	3.000	800
D. Kongresano ne membro de la Asocioj sub A	5.000	5.500	6.000	1.800
E. Familianoj D	2.500	3.000	3.500	1.000
F. Infanoj ĝis 12 jaroj kaj Eksterlandanoj	senpage			

Rilate kotizojn, la valida aliĝdato estas tiu de la poŝtstampo. La aliĝilo validas nur kiam la kotizo estas enspezata. La kotizo ne estas repagebla okaze de ne partopreno.

X Membroj de la Transpireneaj Federacioj rajtas pagi surloke ĉe la alveno.

Tranoktado

Hotelo Carlemany (kvarstela) Pl. Miquel Santaló, 1 - tel. 972-211212 carlemany@grn.es (dulita ĉambro kun banejo) 16.000 p-toj

Hotelo Europa (dustela) Juli Garreta, 21 - tel. 972-202750-
Dulita ĉambro kun banejo 8.025 p-toj

Hotelo Condal (unustela) Joan Maragall, 10
Dulita ĉambro kun banejo 6.400 "

Pensiono Margarit (unustela) Ultònia, 1 - tel. 972-201066-
Dulita ĉambro kun banejo 4.200 "

Junulara Restadejo (kompleta pensio) tranoktado, matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo.. 3.200 "

X (La kongresanoj mendos mem la tranoktadon en la hoteloj, sed rekte al KEA se temas pri la junulara restadejo. Nia asocio ankaŭ peros la tranoktadon de la nekatalunoj kaj en hoteloj kaj en la restadejo)

Bankedo.

Okazos en la restoracio BAU (ĉe la sidejo de la Arkitektura Korporacio, apud la katedralo) laŭ jena menuo: Escalivada amb anĉovoj de l'Escala (Rostitaj vegetajaj bendoj kun anĉovoj el l'Escala); Entrecot amb guarnició (Garnita interripajo) Biscuit amb xocolata calenta (Glaciaĵo kun varma ĉokolado), pano, vino, akvo kaj kafo (prezo 3.000 ptoj).

Manĝoj

Okazos en la sama restoracio po 1.200 p-toj.

INFORMOJ DE GEE (Groupe des enseignants espérantophones)

-Dokumento unupaĝa kun informoj por instrui esperanton en la eduk-sistemo : havebla de GEE aŭ SFS

-Tri dokumentoj en la franca lingvo (a) Letero al lernejestro b) Propedeŭtiko kaj E° c) Kulturo "Europe des langues et E°". La tri dokumentoj kun sendkostoj kostas 20F (GEE-CCP 1018 02 W), haveblas ĉe Joseph Catil 5, Rue des Calabres 69330 Meyzieu)

-Varbmateriale : ok koloraj ekspoziciaj paneloj (pligrandigeblaj) en formato A4 : 80 F al GEE (vidu supre) ĉe Armand Hubert 13, Chemin de la Solitude 57200 Sarreguemines Tel/Fax : 03 87 95 07 75)

GEE provas listigi la geinstruistojn, kiuj instruas esperanton aŭ simpatias al E°. Slipo ĉe SFS.

ALVOKO-ALVOKO-ALVOKO-ALVOKO-ALVOKO...

Depost kiam malaperis "El Popola Ĉinio" kiel papera periodaĵo - tamen ĝi pluviĝas en retversio - elstaras "Monato" la "internacia magazino sendependa", monata revuo tute en esperanto, kun kolorpaĝoj kaj diversaj artikoloj pri la nuntempo ... Tamen ĝia pluivado dependas de sufiĉe granda nombro da abonantoj kaj la tarifo estas tro alta por iuj landoj. Ĉu vi-mem ne povus helpi ?

HELPU, HELPU !!!

La revuo "MONATO" nepre bezonigas novajn abonantojn por pluivigi

Mi prenis sur min la devon kontribui al sukceso de **tiu pluivado**.

Por tio mi imagis jenan sistemon :

Ĉar la abonprezo Ff 256, povas esti troa por certaj personoj, mi sugestis ke, ekzemple, **po du interesitaj homoj**, « Dupont kaj Durand » ĝemeliĝu por aboni. Tiamaniere ĉiu kontribuos **po 128 ff jare**.

Nur Dupont abonas (li ricevas 128 ff de Durand).

Li ricevas la revuon, legas ĝin kaj poste transdonas (aŭ poŝtendas) ĝin al sia kunabonanto. Tiun sistemon mi jam praktikis en mia klubo **kun vera sukceso**.

Ankaŭ **VI** povas bone kontribui al **la pluivado** de revuo nepre bezonata en nia rondo. (Vidu dorsflanken...)

Abonu aŭ kuniĝu por aboni. Sendu la monon (256 ff) al Esperanto France

poŝta ĉeko 855 35 D Paris aŭ bankĉeko al UFE, 4 rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

Ne forgesu skribi ĉe la dorson de la ĉeko "por Monato". Despli, **ankaŭ sur la koverton**, supren kaj maldekstren bonvolu skribi "MONATO" por faciligi la laboron de la sekretariejo.

Vi povas peti provokzempleron ĉe:

"Flandra Esperanto Ligo" Frankrijklei 140, B- 2000 Antwerpen.

Mi esperas pozitivan sukceson kaj kore dankas vin.

Leo Lentaigne (Esperantisto de 1931)

134 Avenue de Palavas 34070 Montpellier (Tel.04.67.22.51.11)

Chaîne de solidarité à laquelle nous vous demandons de participer

(Merci d'avance)

Le samideano qui reçoit cette circulaire a pour mission de la photocopier et de l'envoyer à deux autres samideanoj.

Chacun, à son tour, procédera de la même manière et ainsi de suite. Ce qui fera, en chaîne : 2,4,8,16,32,....256,512,1024, etc. etc ...

Même si vos moyens financiers ne vous permettent pas de souscrire un abonnement ou même un demi-abonnement, **ne rompez pas la chaîne**, au contraire faites un effort supplémentaire pour **diffuser cette circulaire auprès d'autres amis**.

C'est au sein de votre groupe que doit s'exercer votre action, avec psychologie et aimable insistance, auprès des anciens qui ont abandonné, mais aussi et surtout auprès des «**nove bakitaj**» (2^{ème} degré d'étude).

Ce sera pour eux un premier pas dans le mouvement. La périodicité mensuelle de MONATO les tiendra en haleine.

Ils pourront dire enfin fièrement :

« Fine, mi sentas min vera Esperantisto »

Helpu, helpu al la pluivado de la revuo. Dankon.

Alphonse CARLES (1867-1929) : LA KONATA NEKONATULO

En la kroniko "niaj mortintoj", ESPERANTO de januaro 1930, oficiala organo de UEA, sobre anoncis : "S-ro Alphonse Carles, DM kaj Delegito de UEA en Béziers, Hérault, Francujo . Pro reveno de la gazeto ni sciigis pri la morto de nia honora membro, kunfondinto de UEA . Ne ricevinte precizan informon, ni dankus se el la legantaro oni volus nin informi . Skribinte al la sola membro en tiu loko pri detaloj, ni ne ricevis respondon ĝis nun " .

Ankaŭ "Enciklopedio de Esperanto" (1933) liveras tre malmulte da biografiaj notoj pri la kunfondinto de la grupo de Béziers en marto 1904 .

Cetere antaŭ ol sendi sian laboraĵon pri biografio de Francoj al la redaktoroj de EdE intendanto-generalo Bastien, ĉefkunlaboranto, sin turnis al UEA, kies oficeja direktoro, Hans Jakob, tiele respondis (24an de marto 1933) : "Mi ne scias, ĉu vi konis amikon Carles persone. Estis vera sudfranco, tre viva, ĉiam ŝercema kaj bonhumora . Pri li ni nenion havas. Jen kiel okazis : Li estis komitatano de UEA kaj regule partoprenis ĉiujn taskojn de sia ofico, bone respondinte la okazajn decidojn . En 1930 revenis ekzemplero de nia gazeto ESPERANTO al li sendita kun la seka mencio : "Décédé" (= "mortis") . Nenio alia . Nu, ni kutime ne tuj kredas kion poŝto notas sur banderolo de gazeto, ĉar okazis foje ke mortinto tiamaniere bone vivis kaj mire legis la anoncon pri sia morto. Hazarde ni rilatis kun esperantisto en Béziers, kies nomo tre strange estis ankaŭ Carles . Ni demandis lin pri detaloj . Montriĝis do ke Alphonse Carles, nia komitatano, vere mortis, sed la alia Carles ne estas parenca al li kaj ankaŭ ne povis doni pli kompletajn sciigojn pri nia komitatano, kiu mortis sen parencoj . Jen ĉio kion ni sciis kaj sukcesis sciigi . Ne estas multe kaj ankaŭ ni ne sukcesis poste ricevi ion plian . Ni esploris nian kolekton de fotografajoj, sed ne havas tian de li" .

De kiam mi havis enmane la enciklopediajn arkivojn de Bastien, mi interesiĝis pri la biografia enigmo de nia simpatia samregionano . La familia nomo Carles estas sufiĉe ofte renkontebla en la tuta regiono ĉe homoj, kiuj ne havas proksiman parencon ligan inter si . Mia unua paŝo al plia informiĝo, laŭateste de la municipa oficejo pri vivoregistriĝo en Béziers montris, ke li ne mortis en sia loĝeja urbo .

Feliĉe S-ro A. Capus, FD de UEA pri genealogio en Montpellier, bonvolis surloke enketi . Ĉe la departementa arkivejo Hérault li konsultis la oficialajn dokumentojn pri nombrado de la popolo kaj balotoj ekde la komenco de la pasinta jarcento kaj, dank'al la precizaj indikoj, li povis senerare scii, ke Alphonse Carles naskiĝis en 1867 en Gigean, ne malproksime de Montpellier . Li krome eksciis, ke ne en Montpellier mortis nia pioniro .

Ni progresis, sed denove paneis la "enketo" . Kiel esperantisto (n° 4682 en la "adresaro" de Zamenhof - aliĝoj de 1899) A. Carles estas precipe konata kiel elpensito de la asocia reto de delegitoj . Tiam oni parolis pri "konsuloj" . Kun Hodler, Meyer kaj Th. Rousseau, en 1907, eldone de la ĵurnalo ESPERANTO, A. Carles aperigis "Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj", verketon kiu kondukis al la fondo de UEA . Pro tio ne estas mirige, ke li estis delegito ekde la unua jarlibro (1908), ano de la tre limigita unua komitato kaj poste dumviva honora membro .

Unu jaron post la fondo de UEA li ĉeestis en la solena kunveno sub prezido de ĝia honora prezidanto, D-ro Zamenhof, kaj en la publika kunsido de UEA, la 10an de septembro 1909, kadre de la kvina universala kongreso de esperanto en Barcelono .

Cetere jam de 1904 li rilatis kun Zamenhof pri la delegita afero . Laŭ la konsiloj de Zamenhof, Carles sugestis sian ideon al la bulonja kaj ĝeneva kongresoj de 1905 kaj 1906, sed tiam la afero ne estis ankoraŭ matura .

En 1909 eldoniĝis en Parizo lia "Kurludo de toroj" -laŭ PIV la titolo nun estus "Taŭrobatalo" -, kiun li dediĉis al H. Hodler kaj Th. Rousseau, siaj "unuaj kaj bonegaj kolegoj en UEA" . Plurkiale interesa estas tiu-ĉi kvindekpaĝa libreto kiun oni povus dividi en tri partojn :

- a) paĝoj 5-14 : "De kelka tempo la toraj kurludoj laŭ la hispana maniero multe disvastiĝis en la sudo de Franclando" komencis la aŭtoro . Malgraŭ fortaj kontraŭstaroj, en kelkaj sud-francaj urboj nuntempe pluekzistas tiaj primitivaj spektakloj . Eble kulpas la fakto, ke ili okazas en romiaj arenoj aŭ postrestaĵoj bonege konservataj el tiuj pratempaj epokoj kaj moroj .A. Carles klarigas al la legantoj la diversajn fazojn de la hispana kutimo, kiu finiĝas je la mortigo de la taŭro .La franca maniero, provenca aŭ okcitana (Kamarga aŭ Landes-a) estas multe malpli kruela, kvankam ne senriska, kaj ne finiĝas je mortigo de la taŭro .
- b) paĝoj 15-33 : Fakte temas pri traduko de eltiraĵo el "Voyage en Espagne" (= "Vojaĝo en Hispanio) de Théophile Gautier .
- c) paĝoj 34-50 -Leksikono pri fakaj vortoj kaj esprimoj kiu, de tiu vidpunkto, estas io vere originala kaj interesa .


Male al la diro de Jakob al Bastien, Carles ne mortis sen-familia . Li havis filinon (ambaŭ loĝis samadrese) kaj filon, kiuj havis siajn proprajn infanojn ĉu antaŭ ĉu post la morto de la avo . Kiam mi havis la bonŝancon konatiĝi en Perpignan kun plej simpatia pranepo de A. Carles, li apenaŭ aŭdis pri la praavo . Mi tiklis lian scivolemon . Pridemandinte siajn patron kaj geonklojn, magra estis la rezulto .

Ne nur neniuj sciis pri la pionira kaj por ni interesa esperantista agado de A. Carles, sed ankaŭ ne pri la cirkonstancoj de lia morto krom tio ke li mortis "freneza" . "Kun multe da antaŭzorgo oni devas konsideri la formulon", diris al mi lia pranepo . Nunepoke ni eble parolus pri Alzheimer-malsano aŭ io simila, kiu degradas la menson ĝis totala detruo de la neŭrocentroj . Tiam tiajn malsanulojn oni kaŝis kaj ŝajne la familio de A. Carles volis lasi senscie kaj senspure liajn kalvarion kaj forpason .

Restis la demando : kie kaj kiam mortis Alphonse Carles ? Pro propra scivolemo, ne sen malfacilaĵoj kaj obstino, lia pranepo ricevis la sopiratan sciigon : la 19an de aŭgusto 1929 A.Carles estis entombigita en Béziers en la tombon, kies koncesianto li estis . Dank'al tiu informo ni eksciis, ke li mortis en Albi, ĉefa urbo de la najbara departemento Tarn . De tiam estis facile scii, ke li mortis du tagojn antaŭe kaj, iom enprofundigante la oficialan mortoateston, pruviĝis ke li mortis en specialigita hospitalo .

Post tiom da jaroj fine solviĝis la prihistoria enigmo pri la morto de Alphonse Carles kaj tiu-ĉi artikolo celas omaĝi lian memoron .

Jean Amouroux



Poŝtkarto sendita el Béziers la 17an de oktobro 1903 de Alphonse Carles al Paul Fruictier, ĉefredaktoro de la monata centra organo "Lingvo Internacia".

REKTE EL LA MINISTERIO PRI EDUKADO - En direct du Ministère -

Les déclarations de M. Lang n'ont pas manqué dernièrement . Son soutien appuyé aux langues régionales n'a qu'à moitié surpris, des élections sont en vue... Quant à son soutien de l'espéranto (il est loin le temps -mars 98- où il appelait l'attention de son prédécesseur sur la promotion de l'espéranto...) il semble qu'il ait ... évolué . Deux documents pour le prouver ...

Tout d'abord un courrier, signé de sa main, en réponse à une lettre en date du 6 avril de notre jeune ami Michael, qui l'interrogeait sur l'absence de l'espéranto comme option au bac :

"...Je vous félicite d'avoir entrepris l'apprentissage de cette langue et d'y trouver la satisfaction que révèle l'enthousiasme de votre courrier . L'espéranto répond à un idéal de communication universelle que je salue et que j'ai soutenu à de nombreuses reprises . L'absence de cette langue parmi celles, pouvant faire l'objet d'une épreuve facultative au baccalauréat, n'est en aucune façon une décision contre l'espéranto, mais doit être comprise comme la réaffirmation de la nécessité pour tous les élèves de maîtriser au moins deux langues vivantes étrangères . L'exemple d'autres pays montre que cet objectif peut être atteint .

Je suis certain que l'étude de cette langue ne vous a pas détourné vous-même de l'apprentissage de langues vivantes étrangères et de l'accès à la culture liés à ces langues . Je souhaite que la connaissance de l'espéranto, associée à la maîtrise de plusieurs langues vivantes, vous ouvre des possibilités nombreuses de contacts et d'échanges" ...

Merci, Monsieur le Ministre, nous vérifierons le sens du mot "maîtriser" concernant les langues !

Le 5 octobre, Claude Longue-Epée (vice-président d'UFE) et Maurice Sujet (ex-principal de collège) étaient reçus au ministère par M. Goullier, Inspecteur Général, chargé de mission pour les langues vivantes, pour étudier le statut dont pourrait bénéficier l'espéranto dans le système éducatif . Rencontre aimable, d'autres rendez-vous devaient être fixés . Ils sont restés lettre morte, malgré différents rappels . C. Longue-Epée saisissait alors Gérard Caudron, député au Parlement européen et favorable à l'espéranto, du problème . Quelques extraits de la réponse reçue récemment par G. Caudron :

"L'idéal poursuivi par le mouvement espérantiste et l'engagement de ses membres méritent d'être salués et l'intérêt de son approche ne peut être mis en cause, même si le choix de recourir à une langue artificielle pour les échanges internationaux est peu compatible avec le souci de développement du plurilinguisme qui est mis en évidence par l'Année européenne des langues .

L'objectif retenu par la France de maîtrise de deux langues vivantes par tous en plus de la langue maternelle et le plan mis en œuvre avec détermination par le ministre de l'Éducation nationale pour y parvenir, nécessitent que toutes les ressources soient mobilisées pour cet enseignement . L'introduction de l'espéranto parmi les langues proposées pour l'enseignement ou l'évaluation de compétences linguistiques dans l'enseignement scolaire n'est pas prévue .

Ceci n'interdit naturellement pas la présence de cette langue parmi les activités culturelles proposées par des associations ou à titre de projets spécifiques, notamment dans certaines universités" ...

Parfois, la conclusion n'est pas nécessaire . Vive le plurilinguisme... et l'espéranto !

J.H.

Dans la presse régionale, les discussions sur les langues n'ont pas manqué non plus, spécialement après un article du Pr. Matouk (20-5), où il proposait l'enseignement "obligatoire, en sus de l'anglais et de l'espagnol", d'une autre langue européenne . Des lecteurs ont même proposé l'espéranto...

Langues (suite)

■ M. Lang parle de la « maîtrise » d'au moins deux autres langues. Actuellement, tous les jeunes apprennent deux langues étrangères. Que faudrait-il de plus pour arriver à la maîtrise ? Des horaires adaptés, des petits groupes de conversation, des échanges réguliers avec l'étranger, etc. Autrement dit, des moyens et aussi la motivation par un choix élargi (langue régionale ou langue de communication, à chacun de déterminer ses priorités) si le ministère de l'Éducation peut supporter le surcoût financier. Certains choisissent l'enseignement obligatoire de l'anglais et de l'espagnol. Au niveau européen, l'allemand n'a-t-il pas autant sa place numériquement et économiquement ? M. Fournier (*Votre avis du 28 mai*) propose un accord au niveau européen pour une langue « commune qui rapproche » un latin moderne, neutre et accessible, du nom d'espéranto, pratiqué dans au moins 120 pays. Ce serait une excellente proposition pour l'apprentissage d'autres langues et le mot *Europe* signifierait peut-être quelque chose pour ses habitants qui se comprendraient. Pourquoi les choses les plus simples sont-elles les plus difficiles à faire adopter ?

J. H. (*La Canourgue*)

■ Dans quelques mois, passera le euro, l'abandon du franc me laisse mélancolique, pour bien des personnes âgées, c'est un peu de notre identité qui nous échappe... Il faudra bien s'adapter et cela ne sera pas facile pour tous. Mon propos, pour dire que l'on s'est bien précipité pour cette monnaie européenne. A mon avis, l'Europe aurait pu se construire autour d'une langue commune, autrement plus important qu'une monnaie commune, celle-ci pouvant venir plus tard.

L'Europe s'élargit, le nombre de langues augmente. Pour tomber bien des barrières, des obstacles, pourqu'on ne pas instaurer une langue unique. Afin de ne pas favoriser telle ou telle nation, pourqu'on ne pas l'Espéranto appris dans toutes les nations européennes ? Les hommes pourraient enfin se comprendre, ce qui semble indispensable pour trouver une certaine cohésion, une certaine unité. A vrai dire, on peut se demander si les politiques le souhaitent ?

J'entends ces jours-ci notre ministre de l'Enseignement préconiser l'enseignement des langues régionales : breton, basque, provençal, corse... etc. Je vois là un repli, une division et même, si l'on respecte les identités régionales, ne vaudrait-il pas mieux apprendre une langue qui rapproche ? C'est important à l'heure de l'Europe de l'euro.

A. FOURNIER
(*Les Angles*)

M.L. 28/5 et 18/6

À QU 2000 KONGRESANOJ EN LA UK DE ZAGREB ?

Ĝis la 16a de junio estis aliĝintaj al la 86a Universala Kongreso 1578 esperantistoj el 57 landoj. Francio okupas la unuan lokon (kokeriko !) kun 197 aliĝintoj, antaŭ la gastiganta lando Kroatio kun 182. Sekvas Japanio kaj Germanio kun respektive 165 kaj 156. Tiu kvaropo klare distingiĝas rilate la nombro da kongresanoj, ĉar poste venas Pollando kun 71, Italio kun 67 kaj Nederlando 54, Hungario 51, Britio 50, ktp.

Quelles langues parle-t-on dans la Communauté européenne ?

Source : Commission européenne,
Eurobaromètre n° 44

	Langue maternelle	Langue Etrangère	
	%	%	Total
Anglais	16	33	49
Allemand	25	9	34
Français	16	15	31
Italien	16	2	18
Espagnol	9	5	14
Néerlandais	6	1	7
Danois	2	1	3
Portugais	3	0	3
Grec	3	0	3
Suédois	3	1	4
Finnois	1	0	1
Autres	2	3	5

Est-ce l'effet des groupes de pression à l'approche des élections ? L'habile Jack Lang vient en tous cas d'élargir les moyens offerts aux « langues » régionales.

Quantitativement, le gaspillage est encore circonscrit. 150 000 élèves apprennent ces dialectes dont 71 000 l'occitan, 28 000 le corse, 20 000 le breton, un peu moins de 9 000 le basque et autant le catalan, 7 500 l'alsacien, 6 000 le mosellan et 1 000 le "gallo".

Onu La fin du français

► Le répertoire des missions étrangères détachées en permanence auprès des Nations unies à New York révèle une triste réalité. Priés d'indiquer le langage dans lequel ils préféreraient recevoir leur courrier et les rapports officiels, les pays interrogés ont répondu l'anglais à une très large majorité : cent trente réponses sur cent quatre-vingt-cinq. Le français n'arrive qu'en deuxième position (trente-six réponses), devant l'espagnol (dix-neuf). Parmi les rares bonnes nouvelles : le Laos, le Cambodge et la Roumanie ont choisi le français. Mais le Vietnam, le Liechtenstein, l'Italie et la quasi-totalité des pays arabes ont préféré l'anglais!

COURRIER INTERNATIONAL

↓ N° 547

■ Hiérarchie

En 1970,
60 % des débats de la Commission étaient rédigés en français et 40 % en allemand.
En 1989,
la configuration avait changé :
50 % de textes en français,
30 % en anglais et 9 % en allemand.
Puis, en 1997,
le rapport de forces s'est inversé :
l'anglais rafle 45 % des textes, contre 40 % pour le français, les autres langues se partageant le peu qui reste.
D'après Robert Phillipson, auteur de *Language : Equity, Power and Education* (Langues : équité, pouvoir et éducation, Mahwah, New Jersey, Lawrence Erlbaum Associates, 2000), ces chiffres révèlent la hiérarchie de fait des langues à Bruxelles et à Strasbourg.
C'est d'autant plus patent, précise-t-il dans *The Guardian*, que l'anglais est devenu la langue quasi systématique de la communication externe de l'UE.

LE DÉFI DES LANGUES : DU GÂCHIS AU BON SENS (1)

par Claude Piron

Le livre de Claude Piron vient en quelque sorte en contrepoint de l'ouvrage précédent. Depuis la tour de Babel, les peuples ont connu des destins différents et les langages si divers qu'ils ont pratiqués et pratiquent encore ont dressé des barrières pour leur mutuelle compréhension et ont été l'occasion de bien des conflits.

Il y eut une époque où le français eut l'ambition de devenir langue universelle. Aujourd'hui c'est l'anglais qui aspire à l'être, mais il doit concéder de larges espaces à d'autres idiomes. Le développement des communications par multimédia semble lui donner un avantage décisif.

La prééminence d'une langue n'est point neutre. Elle exprime une prépondérance de pouvoir, une primauté économique et politique. Aussi, maints esprits ont à juste titre considéré qu'un langage inventé, distinct des langues connues et pratiquées et, pour ainsi dire, impartial vis-à-vis d'elles, serait le meilleur moyen pour s'engager sur le chemin de la concorde universelle.

L'espéranto a visé cette haute ambition et C. Piron reprend tous les arguments de bon sens qui militent pour cette nouvelle forme d'expression. C'est un livre de foi, de croyance dans une cause élevée propre à surmonter ce que l'auteur appelle le syndrome de la Tour de Babel.

Il met l'accent sur certaines vérités trop souvent oubliées à savoir : le temps qui est nécessaire pour la bonne maîtrise d'une langue (et l'auteur, polyglotte, le sait bien), les aptitudes indispensables que tous ne possèdent pas. Ce devrait être des raisons pour apprendre une « langue rationnelle », débarrassée des subtilités morphologiques et aisée à posséder.

L'auteur remarque, non sans justesse, que si ce langage universel s'instaurait, il serait essentiellement pratique, ne servant point à une littérature élaborée. Les idiomes nationaux en sortiraient renforcés, pouvant être cultivés pour eux-mêmes. On apprendrait l'anglais pour goûter Shakespeare alors que, trop souvent, on ne sait qu'un anglais appauvri, dit de base. On posséderait l'allemand pour lire Goethe ou Thomas Mann dans le texte.


L'espéranto éviterait aussi que les langages les plus usités ne soient, comme il arrive souvent, déformés, détournés de sens, donc trahis, dans ce qu'ils ont de plus authentique. Ce livre qui n'est pas un simple plaidoyer comme il en existe déjà beaucoup mais qui est un exposé des arguments de raison, devrait plaire à notre époque soucieuse de rapidité et d'efficacité.

Mais l'espéranto qui peut faire bon ménage avec les langages du monde entier ne s'imposera sûrement pas sans une volonté politique internationale qui ne semble pas être sur le point de s'affirmer.

André BOISMENU

(1) L'Harmattan 1994



DISTRA PAĜO :**KRUCVORTOJ****Solvoj de la n° 156a :**

BOPARO

Horizontale : I. Laboratori. II. Apologetik. III. Kanonikeco. IV. Trog. Lin. V. Ut. Oregono.

VI. Kav. Ama. Ok. VII. Amindumi. VIII. Reni. Lenna. IX. Inicial. As. X. Otgoorosjt.

Vertikale : 1. Laktukario. 2. Apartament. 3. Bono. Vinig. 4. Ologo. Nico. 5. Ron. Rad. Io.

6. Agitemular. 7. Tek. Gamelo. 8. Otelu. In. 9. Ricino. Naj. 10. Ikonoklast.

ANEKDOTOJ : (El "Monato" de Junio 2001 kaj "Eventoj" 206)

La direktoro riproĉas : "Min mirigas via malrapideco en la laboro. Ĉu vi ion faras rapide ?"
 - "Certe jes ! Mi rapide laciĝas !"

Juĝisto al drinkulo : "Vi estas venigita tien ĉi pro la drinkado".

La akuzito : "Ni drinku do !"

- "Sinjoro kelnero, la kotleto estas tro malmola, mi kapablas formordi el ĝi eĉ ne unu peceton. Venigu al mi la ĉefon !"

- "Vana klopodo, ankaŭ li ne kapablos".

Monologo de enamiĝinto :

- "Ŝi estos venonta je la tria, nun estas la kvara, mi atendas ĝis la kvina, kaj se ŝi ne venos ĝis la sesa, mi iros je la sepa hejmen".

HORIZONTALA

- I) - Kristan(o) kontraŭa.
- II) - Ne kiel la antaŭa.
- III) - Verko / Trovebl(a) en la antaŭa.
- IV) - Verm(o) / Antikva vaz(o).
- V) - Iomaĵo / Trinkaj(o) / Adverbo.
- VI) - s : Muzikil(o) / Arterio.
- VII) - Fluanta.
- VIII) - Antaŭa / Pronomo.
- IX) - s : Pustulo / Neni(o) plu / Mov(i).
- X) - Insuleg(o).

VERTIKALE

S: sone

- 1) - Internacia riglil(o).
- 2) - Kiel arta listo.
- 3) - Nazmalsano / s : Ĉefurbo.
- 4) - Movi / Rilate ekleziulon.
- 5) - Mem(o) / Preta por vino / Meze de fugo.
- 6) - s : Bruo / Agitita.
- 7) - Danc(o).
- 8) - Korpa kavet(o) / Gem(o).
- 9) - Element(o) / Kaj aliaj.
- 10) - F aŭ C, radike.

Antaŭ ol finlegi SFS, bonvolu noti, ke la venonta federacia kunveno okazos **Sabaton, la 22an de septembro, la unuan tagon de aŭtuno en Narbonne**, ekde la deka horo (precize !). Pri detaloj (loko, tagmanĝo, ktp) ni informos la grupojn. Se vi estas izolita esperantist(in)o bonvolu kontakti la sekretarion aŭ SFS. La venonta SFS aperos komence de oktobro, bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 22a de septembro al la adreso : Jean Hénin - Beauregard - Rte de Montcayroux
 Telefono kaj telekopio : 04 66 32 86 36 Retadreso : <Jean.Henin@wanadoo.fr>

Agrablajn Sunajn Ripozigajn Periodojn

48500 La Canourgue !